# 102-a Universala Kongreso de Esperanto

Seulo, 22 – 29 julio 2017

# DUA BULTENO



KONGRESA TEMO

## Turismo kaj evoluo: Vojoj al daŭripovo

# Enhavo


Bonvenon al la kongreslando ........................................ 2
La kongresejo ........................................................................ 3
Utilaj informoj pri Koreio kaj Seulo ................................ 3
Lingvaj kursoj ...................................................................... 5
Provizora programo ........................................................ 6
Kiel mendi servojn? ........................................................ 6
Hoteloj .................................................................................. 8
Kromaj servoj ...................................................................... 10
Ekskursoj .............................................................................. 11
Antaŭ- kaj postkongresaj ekskursoj ........................ 11
Antaŭkongresa ekskurso .................................... 12
Postkongresaj ekskursoj .................................... 13
Ekskursoj dum la kongresa semajno ........................ 16
Tuttagaj ekskursoj ............................................... 16
Duontagaj ekskursoj .......................................... 19
Tabelo de dumkongresaj ekskursoj ........................ 22
Bankedo .............................................................................. 22
Aranĝoj ĉirkaŭ la UK ...................................................... 23
Pliaj informoj ...................................................................... 23
Kontaktinformoj ................................................................ 24


# Loka Kongresa Komitato

| | |
|---|---|
| Prezidanto, eksteraj rilatoj | LEE Young-koo |
| Ĝenerala sekretario | HO Song |
| Kongresejo | KANG Hon-gu |
| Akcepto | OH Soon-mo |
| Volontuloj | PARK Yong-sung |
| Kultura programo | LI Hyonsuk |
| Ekskursoj | HAN Sugheui |
| Programo, IKU | IM Han-u |
| Retejo | PARK Chan-bok |
| Informado, tradukado | CHOE Taesok |
| Kasisto | CHOI You Shik |
| Infana Kongreseto | SHIN Eun-sook |
| Junulara programo | SHIN Hyun Kyu |


Grafiko: C. Magalhães/F.L. Veuthey. (Kovrilo: Placo Dongdaemun. Warren Whyte, CC-BY-SA-3.0)

## 102-a Universala Kongreso de Esperanto

Seulo, 22 – 29 julio 2017

# DUA BULTENO

KONGRESA TEMO

## Turismo kaj evoluo:
## Vojoj al daŭripovo

# Bonvenon al la kongreslando

## Ĝenerale

Bonvolu noti, ke la reguloj pri donado de vizoj malsamas laŭ landoj kaj ke ili konstante ŝanĝiĝas. Tial bv. nepre mem kontroli ĉe la plej proksima diplomatia reprezentejo de Korea Respubliko (bv. mem trovi ĝian adreson en via ĉefurbo aŭ najbara lando), ĉu vi bezonas vizon kaj sub kiuj kondiĉoj. Korea Respubliko havas interkonsenton pri senvizaj vojaĝoj kun 155 landoj (2016). CO/LKK ne povos helpi pri vizpetoj faritaj post la 1-a de majo 2017 kaj principe ne povos respondi al tiuj petoj.

## Dokumentoj

Ĉiu vizitanto devas havi pasporton validan plu minimume ses monatojn post la forirdato, koncernan vizon, samkiel revenbileton. La kongresanoj mem devas zorgi pri akiro de vizoj. En esceptaj kazoj oni povas peti helpon de la CO/LKK.

## Konfirmiloj kaj invitleteroj

Normale la Kongresa Konfirmilo devas sufiĉi por pruvi la kongresanecon al la vizdona instanco. La konsulejoj povas postuli oficialan invitleteron, kiun la CO sendos se oni petos ĝin. Al nealiĝintoj oni ne povas sendi invitleteron nek aliajn konfirmaĵojn. Bonvolu konscii, ke nek la CO nek LKK povas influi la decidojn de la konsulejoj.

## Datoj

Bv. noti, ke la invitletero povas teksti nur por la periodo de la oficiala kongresdaŭro (22-a ĝis 29-a de julio, eventuale plus la daŭro de menditaj antaŭ- kaj/aŭ postkongresoj). Se vi bezonas pli longan restadon, tion vi devas aranĝi private.

## Mongarantioj kaj asekuroj

Senkonsidere ĉu oni havas aŭ ne la vizon (depende de la civitaneco), necesas pruvi ĉe la eniro en la landon, ke oni posedas sufiĉajn monrimedojn por la restado. Al kongresanoj, kiuj mendis kaj pagis loĝadon pere de UEA (aŭ venas je aparta invito de UEA), oni povas sendi, se necese kaj laŭ peto, konfirmon pri la pagitaj servoj. Tio povas parte kompensi la postulon pri posedo de sufiĉaj mon-rimedoj. UEA kaj LKK ne donas financajn garantiojn al kongresanoj. Kongresano mem devas pruvi al la vizdona instanco posedon de sufiĉaj rimedoj por restado en la kongresa lando. Unu el la postuloj por ricevi vizon estas akiro de asekuro, pri kio la kongresanoj zorgu mem. Ofte tute taŭga asekuro estas aĉetebla en via hejmlanda flughaveno.

Sendepende de tio, ĉu necesas havi vizon aŭ ne, ĉiu kongresano prefere asekuru sin por la tuta daŭro de la vojaĝo kaj restado.

## Alveno al Seulo kaj al la kongresejo

Aviadile. Asiana Airlines, la oficiala flug-kompanio de la kongreso, havas bonajn konektojn kun multaj urboj de la mondo. Proksime de Seulo estas du internaciaj flughavenoj – Incheon (ICN) kaj Gimpo (GMP). La bonveniga servo funkcios ĉe la flughaveno Incheon la 22-an de julio.

**En la flughaveno Incheon** oni povas preni flughavenan trajnon ĝis la trajna stacio Seulo (서울역 – Seoul Station) kaj tie ŝanĝi al la metrolinio 1 (direkte al Soyosan) ĝis la haltejo de la kongresejo, Hankuk University of Foreign Studies (외대앞역 – HUFS); la tuta vojaĝo daŭras inter 1h15 kaj 2h00, depende de la

elektita trajno el la flughaveno kaj de la rapideco ŝanĝi de la trajno al la metroo, en la stacio Seulo.

La kostoj de la vojaĝoj inter la flughavenoj kaj la kongresejo varias jene:

1) El ICN: 4850 ŭonojn (ĉ. 3,9 eŭrojn) por la normala trajno kaj la metroo, per la sama bileto;

2) El ICN: 8000 ŭonojn (7500 ŭonojn se el la aŭtomato; 6000 ŭonojn p.p. se por pli ol du homoj vojaĝantaj kune; 6900 ŭonojn por infanoj ĝis-12-jaraj) por la ekspresa trajno plus 1850 ŭonojn por la metrobileto (aĉetebla en la stacio Seulo);

3) **El GMP**: 2250 ŭonojn (ĉ. 1,8 eŭrojn) por la normala trajno kaj la metroo, per la sama bileto. La vojaĝodaŭro estas ĉ. 1h30.

*Oni povas rericevi la 500 ŭonojn de la kaŭcio de la unufoja metrokarto, se oni redonas ĝin al la redonmaŝino, en la halo de la alvenstacioj.*

Eblas atingi la urbon kaj la kongresejon ankaŭ per taksioj kaj busoj.

**Prame**. De Ĉinio kaj Japanio oni povas atingi Koreion prame. De Ĉinio la pramoj alvenas al la korea haveno Incheon, en kiu oni povas preni buson 12 aŭ 24 ĝis la metroa haltejo Dongincheon (동인천역) kaj tie preni la metrolinion 1 ĝis la haltejo HUFS; la tuta vojaĝo povas daŭri ĉirkaŭ 2 horojn. De Japanio la pramoj alvenas al la urbo Busan, de kie oni povas atingi la trajnan stacidomon Seulo post 3-hora veturo per la KTX-trajno (la bileto kostas 59800 ŭonojn). Vidi ĉi-supre kiel iri metroe de la stacio Seulo ĝis la kongresejo.

La kongresejo troviĝas je ĉ. 200 metroj de la metroa haltejo HUFS (eliroj n-ro 1, 5 aŭ 6) fine de la strato Hwigyeong-ro.

# La kongresejo

Hankuk Universitato de Fremdaj Studoj (한국외국어대학교, HUFS), Imun-ro 107, Dongdaemun-gu, KR-02450, Seoul.

Por kongresrilataj aferoj bv. ne skribi al la kongresejo sed nur al la konstanta adreso de UEA en Roterdamo (p. 24).

# Utilaj informoj pri Koreio kaj Seulo

### Situo

Koreio estas lando en la orienta Azio, najbaro de Ĉinio, Rusio kaj Japanio. Ĝi sendependiĝis en 1945 kaj dividiĝis en Sud-Koreion (Korean Respublikon) kaj Nord-Koreion en 1948. Korea Respubliko estas malgranda lando: 100 210 km² kun 51 515 399 (2015) loĝantoj, tamen ekonomie evoluinta lando, en la 15-a loko monde laŭ la malneta enlanda produkto.

Seulo estas la ĉefurbo de Korea Respubliko kaj estas la plej granda urbo, kun 605 km² da vasteco kaj 10 milionoj da

loĝantoj. Ĝi situas en la nordokcidento de Korea Respubliko. Ĝin ĉirkaŭas montoj kaj trafluas la rivero Hangang. Ĝi servas pli ol mil jarojn kiel la politika, ekonomia, socia kaj kultura centro de diversaj regperiodoj. Jam en ĝi okazis i.a. la Aziaj Ludoj de 1986, la Someraj Olimpikaj Ludoj de 1988, la Monda Piedpilka Pokalo de 2002.

## Klimato

En Koreio regas modera klimato. La vintro estas malvarma kaj seka, influata de la kontinenta kontraŭciklono; la somero estas tre varma kaj humida, influata de la nordpacifika kontraŭciklono. La averaĝa alta temperaturo en Seulo en julio kaj aŭgusto estas 27°C — povos esti pli malvarme, sed ankaŭ eblas ke la temperaturo atingos 35°C. Konsilindas kunporti pluvmantelon aŭ ombrelon.

## Lingvoj

La oficiala lingvo estas la korea; ĝi havas 14 konsonantojn kaj 10 vokalojn.

Multaj gejunuloj scipovas la anglan. Konsilindas scipovi almenaŭ legi koreajn vortojn antaŭ ol alveni al Koreio.

## Mono

En Koreio oni uzas ŭonojn (KRW, ₩). Moneroj: 10, 50, 100, 500 ŭonoj. Biletoj: 1000, 5000, 10 000, 50 000. Ĉiuj biletoj estas akceptataj, tamen la bileto de 10 000 estas populare uzata. En januaro 2017 unu eŭro valoris proksimume 1250 ŭonojn. Eblas ŝanĝi monon precipe en flughavenoj kaj bankoj. Bankoj laboras dumsemajne de 9h00 ĝis 16h00. Preskaŭ ĉiuj vendejoj, restoracioj kaj hoteloj akceptas debet-/kreditkartojn.

## Elektro

La elektra tensio estas 220-volta. La surmuraj konektilingoj estas rondaj dupolusaj, samaj kiel en la plej multaj eŭropaj landoj.

## Loka tempo

UTC+9 horoj (somere).

## Telefonado

La prefikso por telefoni al Koreio de eksterlando estas +82; tiam oni ellasu la komencan nulon de la numero. Por telefoni de Koreio al eksterlando: 001 aŭ 002 + landa kodo + telefonnumero. Gravaj numeroj: 112 por polico, 119 por fajrobrigado, savobrigado kaj urĝa medicina helpo.

## Interreto

En pluraj hoteloj, restoracioj, kafejoj ktp troveblas senpagaj retkonektoj. Ankaŭ en la kongresejo mem estos senpaga sendrata interreta konekto. Eksterlandanoj povas aĉeti korean SIM-karton por telefonado kaj retkonekto nur ĉe AREX en la flughaveno Incheon.

## Medikamentoj

Se vi uzas preskribitan medikamenton, bv. kunporti la kuracistan recepton skribita per latinaj literoj. Proksime de la kongresejo estas apotekoj, malfermitaj kutime de 9h00 ĝis 22h00.

## Sanservo

Estas konsilinde ke kongresanoj havu sanasekuron por la daŭro de la vojaĝoj plus restado. UEA ne respondecas pri asekuro de kongresanoj.

## Trinkmono

En Koreio oni ne kutimas doni trinkmonon.

## Trinkakvo

La kranakvo estas senprobleme trinkebla. Eblas ankaŭ aĉeti mineralan akvon plejparte sengasan.

## Enurba trafiko

La ĉefa publika transportilo en Seulo

# Lingvaj kursoj

## Esperantaj kursoj

Dum la UK estos Esperantaj kursoj celitaj al komencantoj kaj por praktikado de la lingvo.

## Korea eksprese

Kiel kutime dum UK-oj, estos bazaj lecionoj pri la loka lingvo, la korea, kun la celo babiligi pri simplaj ĉiutagaĵoj.




estas la metroo. Seulo havas tre ampleksan metroan sistemon, kiu konsistas el 18 linioj kaj 541 haltejoj kaj konektas Seulon kun ĉiudirektaj najbaraj urboj. Unufojan veturkarton oni povas aĉeti ĉe aŭtomataj vendmaŝinoj apud la metroaj enirejoj.
La baza prezo ĝis 10 km da metroa veturo estas 1850 ŭonoj (1350 por veturo + 500 por kaŭcio). Enirante kaj elirante oni tuŝu la terminalon per la unufoja veturkarto aŭ trafika karto kaj elirinte enmetu nur la unufojan veturkarton en specialan aparaton ĉe la elirejo por ricevi la kaŭcion de 500 ŭonoj.

Ĉe haltejoj, kioskoj kaj oportunaj butikoj eblas aĉeti la reŝargeblan trafikan karton T-money (la karto mem kostas 2500-5000 ŭonojn) por metroo, buso kaj trajno, kiu validas por la tuta lando; T-money havas rabaton nur por infanoj (ĝis 12 jaroj) kaj neplenkreskuloj (ĝis 18 jaroj) post la registriĝo.

En Seulo funkcias ĉirkaŭ 8000 publikaj busoj kaj oni povas pagi ĉe la ŝoforoj kontante aŭ per la trafika karto. Unufoja enurba busveturo kostas 1300 ŭonojn. Ekzistas multaj taksioj dividitaj en du specoj. Unu estas mezgranda taksio, kiu estas ĝenerale arĝentkolora kun blua signo sur la tegmento, kostas 3000 ŭonojn ĝis 2 km; la alia estas luksa taksio, korelingve 모범 (Mobeom taxi), kiu estas nigra-kolora kun flava signo sur la tegmento, kaj kostas 5000 ŭonojn ĝis 3 km.

Seulo estas tiom granda kaj homplena, ke la urbo havas signifan problemon de intensa trafiko. Konsilindas kalkuli pli da tempo ol kutime por atingi la celon kaj veturi metroe.

## Sekureco

Koreio estas ĝenerale tre sekura lando, sed, kiel ĉie, estu atentema pri dokumentoj, valoraĵoj, mono ktp. Antaŭ ol eniri taksion, prefere demandu la ŝoforon, kiom kostos la veturado.

# Provizora programo

Ĉi tie aperas nur la plej gravaj programeroj. La Estraro de UEA rezervas al si la rajton fari ŝanĝojn.

**Sabato, 22 julio**. Malfermo de la kongresejo je 9h00. Alveno de la kongresanoj kaj registriĝo. Disdonado de dokumentoj. Komitato de UEA. Unuafojaj Kongresanoj. Libroservo. Movada Foiro/Interkona Vespero. Giĉetoj funkcias ĝis 18h00.

**Dimanĉo, 23 julio**. Solena Inaŭguro (10h00). Libroservo. Inaŭguro de IKU/AIS. Kongresa Temo. E-kursoj. Korea Eksprese. Nacia Vespero.

**Lundo, 24 julio**. Libroservo. IKU-prelegoj. E-kursoj. Kleriga Lundo. Korea eksprese. Teatro. Bankedo. Kongresa Balo.

**Mardo, 25 julio**. Libroservo. E-kursoj. Tago de Lernado. IKU-prelegoj. Kongresa Temo. Estraro respondas. Landa Agado. Delegita Reto. Societo Zamenhof (nur por membroj). Teatro.

**Merkredo, 26 julio**.
Tuttagaj ekskursoj. Kongresejo fermita.

**Ĵaŭdo, 27 julio**. Libroservo. Libroj de la Jaro. IKU-prelegoj. Kongresa Temo. Esperantologia Konferenco. Korea eksprese. Belartaj Konkursoj. E-kursoj. Centra Oficejo respondas. Urba Akcepto (por invititoj). Koncerto.

**Vendredo, 28 julio**. Libroservo. Komitato de UEA. IKU-prelegoj. E-kursoj. Faka Forumo. Aŭkcio. Venontaj UK-oj. Internacia Arta Vespero.

**Sabato, 29 julio**. Solena Fermo (10h00). Libroservo (ĝis 14h00). Fermo de la kongresejo (14h00).

# Kiel mendi servojn?

## Ĝeneralaj kondiĉoj de mendado

La kondiĉoj de mendoj kaj malmendoj estas priskribitaj dorsflanke de la mendilo kaj en la Dua Bulteno. Mendante, ĉiu kongresano akceptas tiujn kondiĉojn.

Bonvolu nepre legi ilin antaŭ ol plenigi kaj sendi vian mendilon.

## Loĝado

Kiel unuan loĝdaton oni kalkulas la daton de la alveno al la hotelo (ekloĝo); se oni venas iam post noktomezo, kalkuliĝas la dato de la antaŭa tago.

Kiel lastan daton oni kalkulas la daton de la forlaso de la hotelo (foriro; do, la daton de la lasta mateno en la hotelo).

## Eniro kaj eliro

Principe, eblas okupi ĉambrojn ekde la 15h00 de la mendita dato, kaj necesas forlasi la ĉambrojn ĝis la 12h00 de la lasta tago. *Se vi ne okupas ĉambron dum la*

*unua mendita tago, oni nuligas la rezervon kaj vi perdas la plenan pagitan sumon por la tuta restadperiodo!*

## Dulitaj ĉambroj/hazarda kunloĝigo

La loĝiga servo ne povas aranĝi hazardan kunloĝigon de nekonatoj, pro kio du- kaj plurlitajn ĉambrojn oni disponigas nur al homoj kiuj anticipe interkonsentis pri kunloĝado kaj menciis tion sur siaj mendiloj. Oni ĉiam fakturas la koston de plena ĉambro, eĉ se la kunloĝanto forestas dum iu(j) tago(j). Por faciligi la trovon de kunloĝanto al homoj kiuj nepre volas loĝi en dulitaj (aŭ plurlitaj) ĉambroj sed ne havas kunloĝanton, en la reta mendilo (http://uea.org/kongresoj/mendilo) troveblas anonctabulo por tiu celo.

## Frueco de la mendo kaj alternativoj

Ĉar la mendeblaj kapacitoj ne estas senlimaj, kaj precipe ĉar la kongreso okazas dum la turisma sezono, gravas mendi kiel eble plej frue. Tial gravas ke ĉe ĉiu mendo oni nepre menciu ankaŭ alternativajn loĝvariantojn. *El la reta mendilo eblas scii, kiuj hoteloj ankoraŭ havas liberajn lokojn.*

## Loĝkonfirmo

Minimume unu monaton antaŭ la UK vi ricevos konfirmon pri via loĝado, kun detalaj informoj pri via hotelo kaj aliaj kongresaj gravaĵoj.

## Ekskursoj

Atente tralegintе la priskribojn bv. elekti la servon kaj plenigi klare (preslitere) la koncernan parton de la mendilo.

Ĉiuj ekskursoj startas de la kongresejo, krom se alie indikite (ĉu en la ekskursa priskribo, ĉu sur la ekskursa bileto). *Klopodu veni dek kvin minutojn antaŭ la indikita starthoro de la ekskurso.* Ĉiujn ekskursojn akompanos Esperantlingvaj gvidantoj. Ili ne estas profesiaj ĉiĉeronoj sed nur bonvolaj helpantoj. Bv. indulgi ilin per pacienco kaj samideana komprenemo. Ili faros sian plejeblon por bone servi al vi.

Kun la kongresaj dokumentoj ĉiuj mendintoj ricevos koverton kun la biletoj de la menditaj ekskursoj kun la bazaj informoj pri ili (dato, horo, buso), kiuj eventuale povos malsami ol tiuj presitaj en la Dua Bulteno. Kaze de malsameco validas la informoj presitaj sur la biletoj.

Ne forgesu preni ŝirmilon kontraŭ suno, vento kaj eventuale pluvo. Bv. noti, ke kelkaj ekskursoj povas esti netaŭgaj por homoj kun marŝhandikapoj; la priskribo de la ekskurso kutime mencias tion.

## Ekskursaj kondiĉoj

Ĉar la ekskursoj dependas de minimumo da partoprenantoj, la organizantoj rezervas al si la rajton eventuale nuligi aŭ altigi la prezojn de iuj el ili. En tiuj kazoj ni klopodos averti vin kiel eble plej frue antaŭ la kongreso por ke eblu ŝanĝi aŭ nuligi la ekskurso(j)n.

## Limdatoj

*La limdato por fari mendojn estas la 15-a de majo 2017.* Mendojn post tiu dato oni plenumos nur escepte, ĝis la 1-a de junio, kaj nepre kontraŭ krompago (40 eŭroj por loĝado kaj antaŭ- kaj postkongresaj ekskursoj kaj 20 eŭroj por la ceteraj ekskursoj/bankedo k.a.). *Eblas malmendi sen punpago nur ĝis la 15-a de aprilo 2017*. *Tamen tio kostos al la malmendanto 15 eŭrojn pro administrado*. Pri la ceteraj malmendaj reguloj konsultu la dorsflankon de la mendilo. La mendilon kaj pagon bv. sendi ĉiam al la sama adreso.

## Plenumo de mendoj

La mendojn oni traktos nur post la ricevo de la koncerna pago.

# Hoteloj

*Ĉiuj prezoj estas en eŭroj por unu persono por unu nokto; p.p. = por persono. HUFS =Hankuk University of Foreign Studies (la kongresejo).*

## Ofertataj servoj

Se ne estas menciite alie, la ĉambroj de la hoteloj havas duŝejon, necesejon, senpagan retaliron, televidilon, telefonon kaj la matenmanĝo estas inkluzivigita en la prezo. La enregistriĝo okazas post la 14h00 kaj la forlaso de la ĉambro estas antaŭ la 12h00. Ekstraj servoj devas esti aranĝitaj surloke kaj pagitaj rekte al la hoteloj. Ĉiuj subaj hoteloj troviĝas proksime de la metrolinio 1, la sama kiu iras preter la kongresejo/HUFS. El la hoteloj eblas iri al la kongresejo (kaj inverse) ankaŭ per busoj (i.a. busoj nr. 120 kaj 261).

## 1. Courtyard Seoul Namdaemun - Marriott ★★★★+

▸ 9, Namdaemun-ro, Jung-gu, Seoul, tel. +82 2 2211 8000, www.courtyardnamdaemun.com (ĉ. 37 min. vojaĝo pieda + metroa, 10 stacioj, ĝis HUFS – metrolinio 1)

Luksa hotelo, 5-stela kategorio kun 4-stela prezo situanta en la koro de unu el la plej popularaj kvartaloj de la urbo: la kultura kaj komerca Namdaemun, je proks. 300 m de la metro-stacio City Hall. La hotelo havas kafejon kaj restoracion kun internacinivelaj manĝoj, gimnastike-jon kaj ofertas sen-pagan buson por la areo ĉirkaŭ la hotelo. La ĉambroj havas 49 colajn plattelevid-ilojn kun 43 diversaj kanaloj, labortablojn kun ergonometriaj seĝoj, sekurŝrankojn, fridujetojn, kafo/teo-maŝinojn, hararsek-igilojn, gladilojn ktp. Ĉiuj ĉambroj estas senfumaj; estas specifaj lokoj por fumado en la hotelo. Tiuj, kiuj mendas la ĉambron pere de UEA, ricevos specialan donacon fare de la hotelo.

*Unupersona ĉambro: € 145; dupersona ĉambro: € 82 p.p.*

*Unupersona ĉambro sen matenmanĝo: € 125; dupersona ĉambro sen matenmanĝo: € 62 p.p.*

## 2. Benikea Premier Hotel Dongdaemun ★★★★

▸ 55, Nangye-ro 29-gil, Jongno-gu, Seoul, tel. +82 2 2231 8721, www.benikeaddm.com (ĉ. 20 min. vojaĝo pieda + metroa, 5 stacioj, ĝis HUFS)

Luksa hotelo je 350 m de la stacio Dongmyo de la metrolinio 1. La hotelo estas taŭga kaj por solaj turistoj kaj por familioj. La ĉambroj estas komfortaj kaj la hotelo havas i.a. gimnastikejon.

*Unupersona ĉambro sen matenmanĝo: € 68; dupersona ĉambro sen matenmanĝo: € 34 p.p.;*

*Unupersona ĉambro kun matenmanĝo: € 77; dupersona ĉambro kun matenmanĝo: € 44 p.p.*

## 3. Benikea Hotel KP ★★★

▸ 188-5, Hoegi-ro, Dongdaemun-gu, Seoul, tel. +82 2 9579 007, http://www.hotelkp.co.kr (650 m de HUFS)

La hotelo troviĝas je 100 m de la stacio Hoegi de la metrolinio 1, unu stacio antaŭ la kongresejo. Komforta hotelo kun tapiŝitaj koridoroj. La ĉambroj havas

fridujeton kaj akvoboligilon. La matenmanĝo ne estas inkluzivita en la prezo, sed eblas mendi ĝin surloke (KRW 11000/tage p.p.).

*Dulita ĉambro: € 39 p.p.*

### 4. Benikea Hotel Flower ★★★

▸ 269, Wangsan-ro, Dongdaemun-gu, Seoul, tel. +82 2 962 8251, http://www.flowerhotel.co.kr/ (1 300 m de HUFS)

La hotelo troviĝas je ĉirkaŭ 25-minuta vojaĝo (4 haltejoj) ĝis la kongresejo per busoj numeroj 120 aŭ 1222. Ampleksa akceptejo kun sofoj, tabloj kaj seĝoj. La komfortaj ĉambroj havas ampleksan necesejon/duŝejon, akvoboligilon, fridujeton kaj labortablon kun seĝo. Je 400 m de la hotelo estas la komenc-/finhaltejo de buso 6002 el ICN-flughaveno.

*Dulita ĉambro: € 33 p.p.*

### 5. Blessing In Seoul ★★★

▸ 2-7 Cheongnyang-ni-dong, Seoul, tel. +82 70 4632 3290, http://cafe.naver.com/blessing2013 (1 000 m de HUFS)

Modesta hotelo je ĉirkaŭ 25-minuta vojaĝo (3 haltejoj) ĝis la kongresejo per busoj 120 aŭ 1222. Simpla akceptejo. Alta konstruaĵo. La hotelo ne ofertas matenmanĝon!

*Dulita ĉambro: € 31 p.p.*

### 6. Hotel Unique ★★

▸ 192, Imun-ro, Dongdaemun-gu, Seoul, tel. +82 2 965 0071, www.uniquebzhotel.com (750 m de HUFS)

Komforta hotelo je 300 m de la stacio Sinimun de la metrolinio 1. Lavmaŝinoj por vestaĵoj sur la 5-a kaj 10-a etaĝoj. La hotelo havas kafejon kaj ĉambron kun komputilo kaj printilo sur la 1-a etaĝo. La gastoj ricevos skatolon kun la matenmanĝo.

*Dulita ĉambro: € 29 p.p.*

### 7. K City Hotel ★★

▸ 192-2, Wangsan-ro, Dongdaemun-gu, Seoul, tel. +82 2 961 6711, kcityhotel.com (2 000 m de HUFS)

Moderna hotelo bele dekoraciita, ĝi troviĝas ĉe la stacio Cheongnyangni de la metrolinio 1, for 2 haltejojn de HUFS. La vojaĝo inter HUFS kaj la hotelo daŭras ĉirkaŭ 10 minutojn, inkluzive de la piedirado ĝis/el la metrostacioj. La hotelo havas plaĉan kafejon sur la teretaĝo. La matenmanĝo ne estas inkluzivita en la prezo, sed eblas aĉeti ĝin surloke (KRW 5000/tage p.p.). La ĉambroj estas lukse dekoraciitaj. Je 150 m de la hotelo estas la komenc-/finhaltejo de buso 6002 el ICN-flughaveno.

*Dulita ĉambro: € 25 p.p.*

### 8. K-haus Hotel ★★

▸ 200-36, Sungin-dong, Jongno-gu, tel. +82 2 2231 1807, www.k-haus.kr (ĉ. 20 min. vojaĝo pieda + metroa, 5 stacioj, ĝis HUFS)

Modesta hotelo je 350 m de la stacio Dongmyo de la metrolinio 1. La ĉambroj estas komfortaj kun la necesaĵoj por plaĉa restado. La hotelo ne ofertas matenmanĝon!

*Dulita ĉambro: € 24 p.p.*

### 9. CMS-INN Seoul ★★

▸ 319-29 Hwigyeong-dong, Dongdaemun-gu, Seoul, tel. +82 2 959 0530, www.cmsinn.com (700 m de HUFS)

La hotelo troviĝas je 20 m de la stacio Hoegi de la metrolinio 1, unu stacion

antaŭ la kongresejo. Populara inter studentoj, ĝi havas terason kaj kuirejon por komuna uzo. La hotelo ne estas taŭga por homoj kun marŝproblemoj pro la altaj ŝtupoj kaj pro tio ke la lifto haltas inter la etaĝoj: oni devas tiam iri laŭ la ŝtuparo supren aŭ suben. La hotelo ne ofertas matenmanĝon.

*Dulita ĉambro: € 27 p.p.; trilita ĉambro: € 24 p.p.*

### 10. Studentaj ĉambroj

La studentaj ĉambroj troviĝas en la kampuso de la universitato HUFS, do, ili estas la plej proksimaj tranoktejoj de la kongresejo. Ĉar temas pri ĉambroj por studentoj, kaj ĉar dum la kongreso estos studentoj en kelkaj ĉambroj, la reguloj pri loĝado aplikiĝos ankaŭ al la kongresanoj de la 102-a UK, kaj la plej gravaj estas, ke viroj kaj virinoj loĝas aparte kaj ke inter la 0h00 kaj 5h00 oni ne povas eniri la konstruaĵon (en la noktoj de vendredo, sabato kaj dimanĉo la fermaj horoj estas inter la 1h00 kaj 4h00). Dum la restado ne estas purigado de la ĉambroj kaj same ne estas ŝanĝoj de la lito- kaj bantukoj. En la konstruaĵo estas maŝinoj por lavi vestaĵojn, aĉeti manĝaĵetojn kaj trinkaĵojn kaj estas gladiloj. La ĉambroj havas necesejon kaj duŝejon, klimatizilon, tablon kaj seĝojn. La kranakvo estas trinkebla. La prezo ne inkluzivas matenmanĝojn.

La prezoj estas por la semajno de la UK, 22-a ĝis 29-a de julio 2017, do, por sep noktoj!

*Dulita ĉambro € 182 p.p.*

> *Vi povas helpi plibonigi la kvaliton de la artaj aranĝoj per donaco al la Arta Kaso. Donacintoj ricevos apartan dankon en la Kongresa Libro.*



## Kromaj servoj

### Manĝoj

En la universitata manĝejo estos servoj per maten-, tag- kaj vespermanĝoj, korestilaj, **aĉeteblaj nur surloke,** per ŭonoj, de ĉiuj kongresanoj. La manĝejo situas proksime de la salono Zamenhof.

- Matenmanĝoj, inter 8h00 kaj 10h00
  Prezo ĉ. € 1,50
- Tagmanĝoj, inter 11h00 kaj 15h00.
  Prezo: ĉ. € 2
- Vespermanĝoj, inter 16h40 kaj 18h50.
  Prezo: ĉ. € 2

## Speciala oferto de la Libroservo




Se vi partoprenos la ĉi-jaran UK, vi povas mendi ion ajn en la stoko de la Libroservo de UEA, kontraŭ kongresa prezo kaj sen sendokostoj. La menditaĵojn vi prenos en la Kongresa Libroservo, kie vi povos ankaŭ pagi por ili, se en via UEA-konto ne estis sufiĉa bonhavo. Por ĝui la oferton, via mendo devas atingi la Libroservon de UEA antaŭ la mezo de majo.
Ne hezitu viziti nian retan katalogon kaj mendi tie: http://katalogo.uea.org
Mendojn oni akceptas ankaŭ per simpla mesaĝo al libroservo@co.uea.org, fakse (+31 10 436 1751), telefone (+31 10 436 1044) aŭ letere (UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando). Nepre indiku vian UEA-kodon en la mendo.

# Ekskursoj

## Antaŭ- kaj postkongresaj ekskursoj

La antaŭ- kaj postkongresaj ekskursoj okazos en Koreio, konatigante la partoprenantojn kun la plej belaj kaj interesaj turismaj allogaĵoj de la lando.

La prezoj inkluzivas:
- restadon en komfortaj hoteloj 3- aŭ 4-stelaj kun matenmanĝoj, krom se alie indikite, tag- kaj vespermanĝoj
- transporton per komfortaj turismaj busoj kaj flugoj (al Jeju-insulo)
- Esperantajn interpretistojn

La prezoj ne inkluzivas:
- trinkaĵojn dum la manĝoj
- ekstrajn elspezojn en la hoteloj, ekz. telefonvokojn
- ekstrajn programerojn dumekskursajn

Se la sinsekvo de la ekskursoj ne povos okazi laŭ la priskriboj, estos proponataj alternativoj. Se iu(j) programero(j) ne povos okazi pro kialoj ekster la homa rego, ekz. katastrofo, UEA ne respondecos pri tiu(j) eventuala(j) nuligo(j).
P3 kaj P4 inkluzivas flugojn, tial ĉiuj partoprenantoj de tiuj ekskursoj plene respondecas pri la ekzakta informo de siaj nomoj al UEA, tiel kiel sur la valida vojaĝodokumento (ekz. pasporto).

# Antaŭkongresa ekskurso

## A1 Orienta parto de Koreio

▸ 17-a – 21-a julio, 5 tagoj / 4 noktoj

17.07 Enloĝiĝo en Center Mark Hotel, Seulo (sen matenmanĝo).

18.07 Je la 8h30 busa ekvojaĝo. Tagmanĝo. Vizito de la kastelo en Jinju, gastronomia kaj historia urbo, konata interalie pro sia sieĝo dum la Imjin-milito. Vojaĝo al Busan, la dua urbo de Korea Respubliko, situanta en la plej suda parto de la lando. Vizito de la UN-parko, kie troviĝas la sola UN-tombejo de la mondo, omaĝe al la pereintoj dum la Korea Milito. Kiel vespermanĝo oni havos la specialaĵon *dolsotbap*, rizaĵon kuiritan kun i.a. nuksoj, pinarbaj semoj, legomoj en ŝtona kuirilo. Tranokto.

19.07 Matenmanĝo. Ekskurso al Dongbaeksum, urba parko kun interesa historio kaj belegaj vidaĵoj, i.a. al la golfo. Iro al Ulsan, industria urbo ĉ. 70 km for de Busan. Vizito de la parko Daewangam kun ĝia centjara pinarbaro. Tagmanĝe oni havos la tipe sud-sudkorean eonyang bulgogi. Daŭrigo al Gyeongju, iama ĉefurbo de la lando, konata ankaŭ kiel muzeo sen muroj. Vizito de la templo Bulguksa kaj de la Gyeongju Nacia Muzeo. Vojaĝo al Daegu, la kvara plej granda urbo de la lando. Vespermanĝo kaj tranokto.

20.07 Matenmanĝo. Ekveturo al la tradicia vilaĝo Andong Haheo, en la listo de Unesko kiel monda heredaĵo. La vilaĝo estas fama pro la tradiciaj domoj, temploj, naturo kaj ankaŭ pro la loka kuirarto. Tagmanĝo. Veturo al Wonju por viziti la Temparkon Hanji. Hanji (laŭlitere: Korea Papero) havas pli ol 1000 jarojn da historio. La kompleksa preparado de la papero kaj ĝiaj utiloj, i.a. vestaĵoj, ŝuoj kaj mebloj, estos detale montrataj dum la vizito. Iro al Sokcho kaj vizito de la urbo kaj de la pavilono Yeonggeumjung, kun neforgesebla vido al la maro. Tranokto.

21.07 Matenmanĝo. Veturo al la tria plej alta monto de Koreio, monto Sorak, kaj al la templo Shinheungsa, konsiderata la plej malnova Zen-templo en la mondo. La plej atentokapta objekto en la loko estas la 14,6 m alta 108 tuna bronza statuo de Budho, realigita per donacoj por simboli la deziron de la korea popolo reunuecigi la dividitan landon. Tagmanĝo. Vizito de unu el la plej belaj pavilonoj en la regiono, Gyeongpodae, rande de lago ĉe la marbordo. Veturo al Yeoju, la naskiĝurbo de la lasta imperiestrino de Koreio, Myeongseong, por viziti la Tombon de la Granda Reĝo Sejong. Ĝi daŭre estas la plej granda turisma allogaĵo de la regiono. Pluvojaĝo al Seulo, kie oni alvenos ĉirkaŭ la 18h00. Fino de la servoj.

*Prezo de la ekskurso en unupersona ĉambro € 740; dulita ĉambro € 560 p.p.*

*Por ekstraj noktoj, bv. kontakti la Kongresan Fakon de UEA.*



# Postkongresaj ekskursoj

## P1 Meza parto de Koreio

▸ 29-a julio – 2-a aŭgusto, 5 tagoj / 4 noktoj



29.07 Enloĝiĝo en Center Mark Hotel (matenmanĝo ne inkluzivita).

30.07 Matena ekiro al Mungyeong (laŭlitere: "aŭdante bonajn novaĵojn"), agrikulturetosa urbo, plena je historio kaj vidindaĵoj. Rigardo de la pasejo Mungyeong Saejae kun ĝia fortikaĵo konstruita en la Joseon-periodo, celita por regi la vojon de Busan al Seulo. Tagmanĝo. Veturo al la tradicia vilaĝo Andong Hahoe, en la listo de Unesko kiel monda heredaĵo. La vilaĝo estas fama pro la tradiciaj domoj, temploj, naturo kaj ankaŭ pro la loka kuirarto. Veturo al Daegu, la kvara plej granda urbo de la lando, plena je parkoj, apudaj montoj, vigla komerco kaj tropika klimato. Vespermanĝo. Tranokto.

31.07 Matenmanĝo. Vizito de la rigardejo de la Parko Absan, la monto plej proksima al la urbo, kun diversaj promenvojoj, budhismaj temploj kaj muzeoj. Veturo al Cheongdo por vizito de la Vintunelo, malnova trajntunelo nuntempe utiligata por stoki, prezenti kaj vendi la regionajn vinojn. Romantika loko kun kelkaj kromaj artverkoj. Tagmanĝo. Iro al Miryang (ankaŭ konata kiel Milyang) por viziti la lokan templon. Preterpaso de la belega Hamyang-regiono por iri al Changwon, la oka urbo de la lando kun riĉa historio kaj promesplena estonto. La urbo havas multajn parkojn kaj stimulas sciencon kaj arton per diversaj agoj. Vespermanĝo kaj tranokto.

1.08 Matenmanĝo. Vojaĝo al Busan. Vizito de la parko Taejongdae, natura parko kun ekstaza naturo, klifoj, faciligiloj por komforta turismado kaj ampleksa alrigardo al la maro el la sud-orienta parto de la duoninsulo. Pluiro al la UN-parko, kie troviĝas la sola UN-tombejo de la mondo, omaĝe al la pereintoj dum la Korea Milito. Tagmanĝo. Vizito de la Oryukdo-ĉielpromenejo, ŝtalvitra strukturo 35 m super la maro, ĉe la loko kie la Orienta kaj Suda Maroj renkontiĝas. Konatiĝo kun la budhisma templo Haedong Yonggunsa (1376), unu el la solaj kaj plej grandaj konstruitaj sur la marbordo, kaj kun Dalmaji Gogae, turisma monteto populara inter geamantoj kiuj venas ĝui la vidon al la plaĝo, maro kaj la luno. Vespermanĝo. Tranokto.

2.08 Matenmanĝo. Transporto al la flughaveno de Busan, Gimhae (PUS). Fino de la servoj.

*Prezo de la ekskurso en unupersona ĉambro € 760; dulita ĉambro € 568 p.p.*

*Por ekstraj noktoj, bv. kontakti la Kongresan Fakon de UEA.*

# P2 Okcidenta parto de Koreio

29-a julio – 2-a aŭgusto, 5 tagoj / 4 noktoj

29.07 Tranokto en Center Mark Hotelo (sen matenmanĝo).

30.07 Ekveturo al Jeonju, en 2010 nomita Internacia Malrapida Urbo, rekone al ĝia malstreĉa vivoritmo. Tagmanĝo. Vizito de la internacie fama vilaĝo Jeonju Hanok, kiu havas pli ol 800 tradiciajn koreajn domojn, nomatajn Hanok, de la muzeo Gyeonggijeon kaj de la katedralo Jeondong. Vojaĝo al Damyang por konatiĝi kun la Damyang-bambuĝardeno Juknokwon. La loko estas tiel vasta, ke plena vizito daŭras ĉ. 1 horon. Pluiro al Sosaewon, tipe korea ĝardeno, konstruita en 1520; inspirplena loko, estis ofte elektata de disĉiploj de Konfuceo por diskuti akademiajn temojn kaj verki siajn laboraĵojn. Vespermanĝo. Tranokto.

31.07 Matenmanĝo. Vojaĝo al Boseong, kie oni aprezos la magiajn pejzaĝojn de la teplantejoj. Tagmanĝo. Konatiĝo kun la insulo Yeosu Odongdo, ĝia lumturo, kun la eta templo Hyangilam. Iro al Gwangyang. Vespermanĝo. Tranokto.

1.08 Matenmnaĝo. Ekveturo al Umeokultivejo, tipa por la regiono. Pluiro al Jinju, kie oni vizitos la kastelon. Jinju estas gastronomia kaj historia urbo, konata interalie pro sia sieĝo dum la Imjin-milito. Tagmanĝo. Vojaĝo al Changwon, la oka urbo de la lando, kun riĉa historio kaj promesplena estonto. La urbo havas multajn parkojn kaj stimulas sciencon kaj arton per diversaj agoj. Konatiĝo kun tipaj regionaj domoj. Daŭrigo al Busan. Vizito de Dongbaeksum, urba parko kun interesa historio kaj belegaj vidaĵoj, i.a. al la golfo. Vespermanĝo. Tranokto.

2.08 Matenmanĝo. Transporto al la flughaveno de Busan. Fino de la servoj.

*Prezo de la ekskurso en unupersona ĉambro € 775; dulita ĉambro € 570 p.p.*

*Por ekstraj noktoj, bv. kontakti la Kongresan Fakon de UEA.*





## P3 **Busan - Jeju – Seulo** (kombinebla kun P1 kaj P2)

▸ 2-a – 4-a aŭgusto, 3 tagoj / 2 noktoj

2.08 Matena flugo el Busan (PUS) al la insulo Jeju. Jeju estas ege populara ekskursocelo kaj de koreoj kaj de internaciaj turistoj. Krom pri politika aŭtonomio, la insulo estas konata pro siaj unikaj pejzaĝoj, historio kaj legendoj. Tagmanĝo. Vizito de la Tradicia Naturmuzeo Jeju kaj de la Naturforsta ripozejo Jeomul. Konatiĝo kun la vulkankratero ĉe Sangumburi.

3.08 Matenmanĝo. Vizito de la loka botanika ĝardeno. Iro al la Jusangjeolli-klifoj, tagmanĝo, rigardo al la Oedolgoe-roko, konatiĝo kun la Jungbang-akvofalo kaj vizito al la Tradicia Vilaĝo Seongeup.

4.08 Matenmanĝo. Veturo al la Seongsan (Sunleviĝa Monto), listigita kiel monda heredaĵo de Unesko. Iro al Seopjikoji, loko kie diversaj televidserioj de Koreio estis filmitaj. Promeno en Bijarim, muskata praarbaro. Tagmanĝo kaj transporto al la flughaveno por la flugo al Seulo. Alveno en la flughaveno Gimpo (GMP) ĉirkaŭ la 17h30. Fino de la servoj.

*Prezo de la ekskurso en unupersona ĉambro € 680; dulita ĉambro € 620 p.p.*

*Por ekstraj noktoj, bv. kontakti la Kongresan Fakon de UEA.*

## P4 **Seulo –Jeju – Seulo**

▸ 29-a julio – 2-a aŭgusto, 5 tagoj / 4 noktoj

29.07 Enhoteliĝo en Center Mark Hotel (sen matenmanĝo).

30.07 Frumatena transporto al la flughaveno Gimpo por la flugo al la insulo Jeju. Alveno. Tagmanĝo. Rigardo al la roko Jongduam (Draka Kapo), vizito de la Tradicia Naturmuzeo Jeju kaj parko. Vespermanĝo. Tranokto.

31.07 Matenmanĝo. Vizito de la Te-muzeo Osulloc, la unua te-muzeo en Koreio kaj elektita de la revuo *Designboom* kiel unu el la 10 plej bonaj muzeoj en la mondo. Iro al unu el la diversaj parkoj de la insulo. Tagmanĝo. Vizito de la Botanika Ĝardeno. Pluiro por rigardi al la sesflankaj ŝtonoj ĉe la klifoj Jusangjeolli. Promeno al la regiono de la Oedolgoe-roko. Vespermanĝo. Tranokto.

1.08 Matenmanĝo. Iro al la insuleto Udo, kie oni konatiĝos kun la ĉarma kamparana loka etoso. Tagmanĝo. Veturo al la Seongsan (Sunleviĝa Monto), listigita kiel monda heredaĵo de Unesko. Iro al Seopjikoji, loko kie diversaj televidserioj de Koreio estis filmitaj. Vizito de la Marista Muzeo. Vespermanĝo. Tranokto.

2.08 Matenmanĝo. Vizito de la Mistera Strato, loko, kie objektoj defias la graviton. Vizito de la temparko Sumokwon por vidi i.a. la 3- kaj 5-dimensiajn skulptaĵojn en glacio. Tagmanĝo. Iro al la flughaveno por la flugo al Seulo. Alveno en la flughaveno Gimpo (GMP) ĉirkaŭ la 17h30. Fino de la servoj.

*Prezo de la ekskurso en unupersona ĉambro € 859; dulita ĉambro € 746 p.p.*

*Por ekstraj noktoj, bv. kontakti la Kongresan Fakon de UEA.*

# Ekskursoj dum la kongresa semajno

## Tuttagaj ekskursoj

### E1 KSZ kaj Imjingak

▸ Mardo kaj merkredo 9h00 – 17h30 Prezo: € 74

La korea senarmeigita zono (KSZ), je ĉ. 70 km de Seulo, estis kreita ĉe la fino de la korea milito en 1953 por servi kiel bufroareo inter ambaŭ Koreioj. La zono, longa je 250 km kaj vasta je 4 km, estas prezervita, senhoma, kaj la plej granda naturrezervejo de Azio, kun abundaj faŭno kaj flaŭro. En ĝi troviĝas la renkontiĝejo Panmunjeom inter la du ŝtatoj.



Imjingak estas parko ĉe la bordo de la rivero Imjingang proksime de KSZ. Ĝi havas multajn statuojn kaj monumentojn rilatajn al la Korea Milito kaj estis fondita por konsoli homojn el ambaŭ flankoj, kiuj ne povas reveni al siaj hejmlokoj por revidi parencojn aŭ amikojn pro la dividiĝo de la Korea duoninsulo. El la elrigardejo vidiĝas tero de Norda Koreio. Vi propraokule konatiĝos kun tiu unika regiono kaj spertos la restaĵon de la malvarmamilita erao. Kunporti pasporton!

## E2 Korea Folklora Vilaĝo kaj Fortikaĵo Hwaseong

▸ Merkredo kaj ĵaŭdo  9h00 – 17h30  Prezo: € 49

La korea folklora vilaĝo Minsokchon estas subĉiela vivanta muzeo en la urbo Yongin kaj ĝi tutece prezentas la tradician vivon de la 500-jara dinastio Joseon. La vilaĝo estas tre populara turismejo por koreoj kaj eksterlandanoj. Ĝi estis fondita en 1974 kaj havas ĉirkaŭ 270 tradiciajn konstruaĵojn de malsamaj sociaj klasoj el diversaj regionoj. La vilaĝo havas ankaŭ tradician bazaron, manĝejojn kaj man-laborejojn. Rolulој amuzas la vizitantojn per tradiciaj ludoj kaj spektakloj por ke tiuj povu sperti la tradician korean kulturon.

La reĝo Jeongjo translokis la tombon de sia patro al la urbo Suwon fine de la 18-a jc kaj ĉirkaŭigis ĝin per la defenda fortikaĵo Hwaseong, kiu longas je 6 km. Nuntempe ĝi ĉirkaŭas la centron de la urbo. La fortikaĵo havas kvar pordegojn, bastionojn, kanonturojn, fumsignalajn turojn, arkpafejojn, gvatoturojn, sekretajn pordojn kaj aliajn. Ĝi prezentas ĉiujn elementojn de korea fortikaĵo kaj bone montras ĝian arkitekturan teknikon.
La fortikaĵo estis listigita en 1997 kiel monda kultura heredaĵo de Unesko.

## E3 Vilaĝo Hanok en Jeonju

▸ Merkredo  8h00 – 18h30  Prezo: € 56

Jeonju estas grava urbo de la sud-okcidenta regiono de Koreio. Ĝi estis la ĉefurbo de la dinastio Hubaekje (892-936) kaj la spirita ĉefurbo de la dinastio Joseon (1392-1897), kies fondoreĝo devenis de tie, konata kiel la urbo de tradiciaj artoj kaj unu el la plej vizitataj turismaj urboj en Koreio. La plej alloga turismejo estas la vilaĝo Hanok, kio signifas ‘korea tradicia domo’. La vilaĝo, kun pli ol 800 koreaj tradiciaj konstruaĵoj, ekestis antaŭ 100 jaroj por kontraŭi la disvastiĝon de japanaj loĝdomoj en la urbo. La kontrasto inter la antikva kaj moderna arkitekturoj vekas apartan, belan senton. La urbo estas fama ankaŭ pro bongustaj manĝaĵoj, ekzemple, *bibimbapo* (miksita rizo kun multaj sezonaj legomoj) kaj loka makolio kun diversaj medicinaj herboj. Krome, la urbo




estas la centro de *pansorio* (ĝenro de korea muzika rakontado plenumata de unu kantisto kaj unu tamburisto), listigita de Unesko en 2003 kiel nemateria kultura heredaĵo de la homaro.

## E4 Buyeo – iama ĉefurdo de Baekje

▸ Lundo kaj merkredo 8h00 – 18h00 Prezo: € 48

Buyeo (historia nomo: Sabi) estis la lasta ĉefurbo (538-660) de la dinastio Baekje (18 a.K.–660 p.K.). Buyeo devenas de la nomo de la antikva korea regno Buyeo (2-a jc a.K.–494 p.K.), kiu regis en la nuna regiono de Manĉurio. En la loko estis fondita la kultura komplekso de Baekje kaj la historiaj areoj estis listigitaj en 2015 kiel monda kultura heredaĵo de Unesko. La komplekso inkluzivas diversajn allogaĵojn, el kiuj oni vizitos la reĝan tombaron Neungsanni, la surmontajn fortikaĵojn Busosanseong kaj Naseong, la rokon Nakhwaam, el kiu laŭlegende tri mil servistinoj ĵetis sin en la riveron pro la disfalo de la tiama dinastio, la nacian muzeon kun multaj arkeologiaj malkovraĵoj, la templon Jeongnimsa kun kvinetaĝa granita pagodo, la unuan artefaritan lagon de Koreio kaj aliajn. Krome ni ĝuos montpejzaĝon per plezurŝipo. Oni ekscios pri la 700-jara dinastio Baekje, kiu regis en la Korea duoninsulo kun la aliaj du regnoj de Goguryeo kaj Silla.

## E5 Templo Jeondeungsa en Ganghwa

▸ Merkredo kaj vendredo 9h00 – 18h00 Prezo: € 48



Ganghwa, insulo proksime de Incheon, pro sia unika geografia situo, influis la leviĝon kaj ruiniĝon de siatempaj potencoj. Estas dirite, ke Dangun, la fondinto de la antikva korea dinastio Gojoseon (?–108 a.K.), konstruigis altaron sur la pinto de la monto Manisan kaj dediĉis oferojn al siaj praulој. En la 13-a jc la kortego de la dinastio Goryeo rifuĝis en la insulo kaj Ganghwa rolis kiel la dua ĉefurbo, kiam Mongolio invadis Koreion en 1232. Post kiam Goryeo kapitulacis al la mongoloj, la militistaj koreaj elitoj ribelis (1270-1273) kontraŭ Goryeo kaj la invadantoj. Ĉi tie okazis bataloj kontraŭ la franca, usona kaj japana mararmeoj en la dua duono de la 19-a jarcento. La templo Jeondeungsa estis fondita en la kvara jarcento kaj, post incendio, restaŭrita en 1621. Ekde 1678 ĝi estis unu el la kvar lokoj, en kiuj oni konservis *La Kronikojn* (1413-1865) de la Dinastio Joseon. *La Kronikoj* estis listigitaj en 1997 kiel monda kultura heredaĵo de Unesko. La regiono havas vastan marskon, kie eblas propramane kapti konkojn, krabojn kaj aliajn estaĵojn el la mara ŝlimo. Ne rekomendita por homoj kun marŝproblemoj.

## E6 Templo Silleuksa en Yeoju kaj Ceramika Muzeo en Icheon

▸ Merkredo 9h00 – 18h00 Prezo: € 49

Yeoju situas en la loko de ebenaĵo kaj altaĵo ĉe la rivero Namhangang kaj estas fama pro sia bongusta rizo. La templo Silleuksa estas la sola templo en Koreio, kiu estis konstruita ĉe riverbordo. La templo estis fondita de la fama budh-ana monaĥo Wonhyo en 580. Ĝi fariĝis preĝloko dediĉita al la tombo de la reĝo Sejong (1397-1450), kiu estis translokita en 1469 al Yeoju. La templo havas plurajn trezorojn kaj en ĝia korto staras 500-jara junipero kaj 600-jara ginko.

La ceramika muzeo situas en Icheon najbare de Yeoju. Icheon estas konata kiel la centro de korea ceramika industrio kaj tie ekestis ceramikarta vilaĝo kun pli ol 200 metiejoj, kie oni povas rigardi kaj aĉeti altnivelajn ceramikaĵojn. Jen la plej bona okazo konatiĝi kun la historio kaj tradicio de la korea ceramika arto.

# Duontagaj ekskursoj



## D1 Palaco Gyeongbokgung kaj Sarangchae

▸ Vendr. 8h00 – 12h00 Prezo: € 28

La palaco Gyeongbonkgung (1395), estis la reĝa ĉefpalaco de la dinastio Joseon ĝis 1592, kiam la japanaj invad-antoj forbruligis plejparton de la palacaj konstruaĵoj. Ĝi servis kiel domo de la reĝoj kaj reĝa personaro kaj ankaŭ kiel la registara oficejo kaj estis simbolo de la nacia suvereneco, tial sisteme detruita dum la japana okupo. Plene restaŭrita en 1990, la palaco nun en preskaŭ sia origi-nala formo estas la plej bela kaj granda el ĉiuj kvin palacoj de la dinastio Joseon. En ĝi troviĝas ankaŭ la nacia palaca muzeo kaj la nacia folklora muzeo.

Gwanghwamun estas la enira ĉefpordego al la palaco Gyeongbokgung. Sarangchae estas la historia memordomo de la korea prezidentejo, kiu prezentas la pasintecon, nuntempon kaj estontecon de Koreio kaj Seulo kaj eksponas ankaŭ koreajn tradiciajn metiaĵojn kaj aĵojn rila-tajn al la diversaj sinsekvaj prezidentoj.

## D2 Palaco Changdeokgung kaj kvartalo Insadong

▸ Mardo 8h00 – 12h00    Prezo: € 29

La palaco Changdeokgung estis ekkonstruita en 1405 kiel la dua palaco oriente de Gyeongbokgung, sed rolis kiel la ĉefpalaco post la forbrulo de Gyeongbokgung. La palaco estis plej longatempe loĝata de reĝoj kaj preferata de multaj princoj. Kompare kun Gyeongbokgung, kiu estis konstruita por intence montri la dinastian dignecon, Changdeokgung estis strukturita konforme al la ĉirkaŭa naturo kaj sekvis la palacan tradicion de pli frua epoko kaj plej bone konservas la originalan formon el ĉiuj kvin palacoj de la dinastio Joseon. La malantaŭĝardeno de Changdeokgung estas la sola malantaŭĝardeno de koreaj palacoj kaj reprezentas koreajn tradiciajn ĝardenojn. Pro sia alta valoro la palaco estis listigia en 1997 kiel monda kultura heredaĵo de Unesko.

Insadong troviĝas pli ol 600 jarojn en la kerna parto de Seulo kaj estas konata kiel tradicia areo kaj reprezentas la kulturan historion de Koreio. Ĝiaj stratoj estas plenaj de antikvaĵejoj, artvendejoj, butikoj, galerioj, kafejoj, teejoj kaj restoracioj. Ĝi estas unu el la plej popularaj seulaj turismejoj por eksterlandoj.

## D3 Dezajna Placo Dongdaemun kaj Bazaro Gwangjang

▸ Lundo 8h00 – 12h00    Prezo: € 24

La dezajna placo Dongdaemun estas multkultura komplekso kaj grava orientilo de Seulo por urba disvolviĝo. La granda konstruaĵareo estas korea moda nabo kaj populara turisma celo. La placo estis konstruita en la estinta loko de la bazopilka kaj la piedpilka stadionoj. En ĝi estas informejoj, dezajna muzeo, dezajna galerio, historia salono, konferencejoj, ekspoziciejoj kaj aliaj.

La bazaro Gwangjang estis malfermita en 1905 kaj estas la unua kaj plej granda ĉiutaga bazaro de Koreio kun pli ol 5000 vendejoj de teksaĵoj, vestaĵoj, manlaboraĵoj, tradiciaj medicinaĵoj, kuirujoj, memoraĵoj kaj manĝejoj de korea tradicia kuirarto. La bazaro estas fama pro la mungfaba patkuko *bindaettok* kaj la narkotika algorizaĵo *mayakgimbap*.

***Per la reta mendilo viaj mendoj estas tuj traktataj. Krome vi povas realtempe sekvi, kiuj servoj restas disponeblaj.***

## D4 Piediro laŭ la urbomuro Hanyang

▸ Lundo 8h00 – 12h00    Prezo: € 23

En 1396 Hanyang (la malnova nomo de Seulo) estis ĉirkaŭmurita je 18,6 km por defendi kaj protekti la ĉefurbon de la dinastio Joseon. La muro ligas kvar montojn kaj havas kvar pordegojn kaj kvar pordojn. La muro estis multe detruita dum la japana okupo kaj la korea milito, kaj nun estas 70-procente restaŭrita. Ĉirkaŭ la urbomuro estas pli ol 100 naciaj kaj urbaj kulturaj trezoroj. Piede, dum 3,5 km, oni ekskursos laŭ la urbomuro sur la monto Bukaksan, laŭ la parko Waryong – Malbawigil – preter la pordoj Sukjeongmun kaj Changeuimun. Dum la monta promenado oni renkontos la ekologian medion, historion, kulturon kaj naturon de Seulo. Plej alloga estas la fascina rigardo al la Seula urbocentro, kie harmonias tradicio kaj moderno. Ne rekomendita por homoj kun marŝproblemoj.

## D5 Botanikejo Hongneung

▸ Ĵaŭdo 8h00 – 12h00 Prezo: € 23

La botanikejo Hongneung situas en la orienta parto de Seulo, proksime de la kongresejo kaj estas la eksperimenta arbaro de la Korea Arbara Esplorinstituto. La loko antaŭe estis la tombo de la imperiestrino Myeongseong. Post la translokado de la tombo, en 1922 ĝi iĝis la unua botanika arbaro de Koreio. Nun tie troviĝas entute 1224 arbospecioj kaj 811 herbospecioj, el la tuta mondo. Ĝi estas la perfekta loko por ekkoni diversregionajn plantojn el Koreio, ĝui promenadon en la arbaro kaj fuĝi de la somera varmo.

## D6 Seula Turo en Namsan kaj Itaewon

▸ Merkr. 18h00 – 22h00 Prezo: € 30

La seula turo YTN (1975), 236 m, situas sur la pinto de la monto Namsan en la urbocentro kaj markas la plej altan punkton en Seulo krom la monda turo Lotte. Supre de la turo estas elrigardejo, el kiu, en hela tago, eblas vidi la tutan urbon. La elrigardeja parto de la turo plene rivoluas dum 48 minutojn.

Itaewon estas populara por seulanoj kaj eksterlandaj turistoj. En la kvartalo loĝas multaj eksterlandanoj, inter kiuj usonaj soldatoj, kaj ĝin karakterizas diverslandaj kulturoj. Ĉi tie oni povas ĝui hindan, pakistanan, turkan, tajlandan, germanan, hispanan, italan, anglan, francan kaj meksikan kuirartojn, kiuj ne vaste haveblas en Koreio. En ĝi troviĝas multaj vendejoj, kiuj liveras ne nur koreajn produktaĵojn, sed ankaŭ aŭtentikajn importaĵojn. Tial Itaewon estas konata kiel "okcidenta kvartalo".

## D7 Koreaj Manĝaĵoj

▸ Ĵaŭdo 13h00 – 18h00 Prezo: € 34

En la korea kuirarto estas ne nur kimĉio kaj *bulgogio*, sed sennombraj specialaj manĝaĵoj. Unu el ili estas la rizkuko *tteok*, kiu estas farata el la faruno de glueca rizo kun diversaj nuksoj, fruktoj kaj aliaj ingrediencoj. Oni vizitos la rizkukan muzeon en la urbocentro. Eksponataj estas diversaj rizkukoj ĝuataj dum festotagoj kaj festenoj en Koreio kaj ankaŭ sezonaj rizkukoj. Vi vidos ankaŭ multajn koreajn manĝaĵojn uzatajn en tradiciaj ritoj.

## D8 Nacia Muzeo kaj Muzeo de Hangulo

▸ Dim. 13h00 – 17h00 Prezo: € 28

La Nacia Muzeo de Koreio (1945) estas la ĉefmuzeo de la koreaj historio kaj arto, kaj la kultura organizaĵo, kiu reprezentas Koreion. Ĝi ne nur montras ekspoziciaĵojn, sed ankaŭ plenumas diversajn studojn kaj esplorojn en la kampoj de arkeologio, historio kaj arto. Ĝi konsistas el 6 sekcioj kaj 50 ĉambroj kun 12 044 objektoj. Alte valoraj estas la ora krono el la 5-a jc, la meditanta bodisatvo el la 7-a jc, la ceramika incensujo el la 12-a jc kaj la 5-etaĝa pagodo el la 14-a jc. La muzeo ricevas pli ol tri milionoj da vizitantoj jare, kiu faras el ĝi unu el la plej vizitataj muzeoj en la mondo.

La Nacia Muzeo de Hangulo (2014) temas pri hangulo, la korea alfabeto. Hangulo estis kreita de la reĝo Sejong en 1443, por ke la simpla popolo povu skribi la korean lingvon. Ĝis tiam la kleruloj uzadis la ĉinajn skribsignojn. Vi konatiĝos kun la ekesto, populariĝo kaj lastatempa disvastiĝo de hangulo per tradiciaj kaj multrimedaj kaj interaktivaj ekspozicioj.

# Tabelo de dumkongresaj ekskursoj

| | Dim | Lun | Mar | Mer | Ĵaŭ | Ven | Prezo € |
|---|---|---|---|---|---|---|---|
| **E1** KSZ kaj Imjingak | | | T | T | | | 74 |
| **E2** Folklora Vilaĝo | | | | T | T | | 49 |
| **E3** Vilaĝo Hanok | | | | T | | | 56 |
| **E4** Buyeo | | T | | T | | | 48 |
| **E5** Jeondeungsa | | | | T | | T | 48 |
| **E6** Silleuksa-Muzeo | | | | T | | | 49 |
| **D1** Gyeongbokgung | | | | | | M | 28 |
| **D2** Changdeokgung | | | M | | | | 29 |
| **D3** Dongdaemun | | M | | | | | 24 |
| **D4** Hanyang | | M | | | | | 23 |
| **D5** Botanikejo | | | | | M | | 23 |
| **D6** Seula Turo | | | | V | | | 30 |
| **D7** Koreaj Manĝaĵoj | | | | | P | | 34 |
| **D8** Nacia Muzeo | P | | | | | | 28 |

# Bankedo

La bankedo okazos en la Memorhalo Reĝo Sejong, 1800 m for de la kongresejo (adreso: 세종대왕 기념관 1-157 Cheongnyangri-dong, Dongdaemun-gu, Seoul), la 24-an de julio je la 19h30. La bankedo konsistos el:

***Dekoj da malsamaj, tipe koreaj manĝaĵoj,***
*inkluzive vegetarajn, libere elekteblaj el la bufedo*

***Desertoj***

***Trinkaĵoj***
*Biero, soju (korea alkoholaĵo 19%), sukoj, gastrinkaĵoj, akvo, teo/kafo.*
*Oni rajtos kunporti proprajn trinkaĵojn, ekzemple vinon, laŭplaĉe.*

Prezo: € 50

# Aranĝoj ĉirkaŭ la UK

ILEI: La **50-a Kongreso de ILEI** (15 – 22 julio), kun la temo "Edukado al respekto-plena turismo", okazos en Busan, Korea Resp. Pliaj informoj: www.ilei.info.

Komercistoj: La **1-a Komuna Konferenco de IKEF** (20 – 22 julio) okazos en Seulo. Pliaj informoj kaj aliĝo: http://kara123453.wixsite.com/mysite.

IIK: La **46-a Internacia Infana Kongreseto** (22 – 29 julio), kun la temo "Kolora mondo", okazos en Seulo, ĉ. 10 km for de la UK. Pliaj informoj kaj aliĝo: http://bertosch.free.fr/iik2017/.

Meditado: La **13-a Internacia E-Renkontiĝo de Meditado** (29 julio – 1 aŭgusto) okazos en Iksan kaj Yeongsan, Korea Resp. Pliaj informoj: http://blog.chojus.com/4682.

Sennacieca Asocio Tutmonda: La **90-a SAT-Kongreso** (29 julio – 5 aŭgusto) okazos en Gimpo, Koreio. Pliaj informoj kaj aliĝo: http://sat90.org/.

IJK: La **73-a Internacia Junulara Kongreso** (5 – 12 aŭgusto) okazos en Aneho, Togolando. Pliaj informoj: http://tejo.org/agado/internacia-junulara-kongreso/.

# Pliaj informoj

## Disdonado de reklamiloj, informiloj

UK estas la plej bona okazo por informi la movadan publikon pri nova iniciato, speciala agado de via faka asocio, reklami novan eldonaĵon, fari donacon al ĉiuj kongresanoj, anonci renkontiĝon, kurson, varon ktp. Plej efike estas meti la informilon en la dokumentujon kiun ricevas ĉiu kongresano. Tiu servo kostas € 275 kaj necesas peti permeson de la Estraro de UEA (bv. kontakti la CO); nenio rajtas esti distribuata kongreseje sen tiu permeso.

## Salonmendoj, standoj kaj budoj

Ĉiuj fakaj asocioj konataj al UEA ricevis mendilon pri salono por sia kunveno dum la UK. Salonmendoj devas atingi la Centran Oficejon ĝis la 31-a de marto de la kongresa jaro. Malfruajn mendojn oni traktas malprioritate kaj eblas postuli por ili ekstran lupagon. Salonon por kunveno ne povas mendi individuo (ekz. por prelego), sed nur asocioj. Se via asocio ne ricevis la mendilon, bv. peti ĝin ĉe la konstanta adreso. Asocioj, movadoj, firmaoj, eldonejoj, revuoj aŭ grupoj kiuj volas aparte informi, disdoni broŝurojn, kolekti kotizojn k.s., povas mendi standon aŭ lokon por instali sian budon dum la kongreso (€ 400). La budon oni ne rajtas uzi por komercaj celoj (vendado de libroj, insignoj k.s.), sed jes por kolekti mendojn.

## Kongresa Libroservo

Jen unika okazo aktualigi vian bibliotekon: en la Kongresa Libroservo multaj novaj libroj estos unuafoje lanĉitaj kaj plurajn titolojn eblos aĉeti kun speciala rabato. Ĝi havas ekskluzivan rajton vendi librojn kaj aliajn esperantaĵojn dum la UK. Por vendigi viajn eldonaĵojn, necesas oferti ilin al la Libroservo de UEA (CO) minimume du monatojn antaŭ la kongreso.

## Pagmanieroj

Estas diversaj kontoj kaj manieroj per kiuj oni povas pagi siajn kongresajn mendojn. Elektu tiun kiu estas por vi

la plej oportuna. Tamen bv. noti ke la plej sekura kaj rapida vojo estas banka monĝiro. Bv. konsideri malfermon de konstanta konto ĉe UEA, ĉar tio havas plurajn avantaĝojn. Bv. ĉiam sendi pagojn kaj rilatajn mendilojn al la sama instanco.

La pagojn por mendoj faru rekte laŭ unu el jenaj manieroj:

**Banko.** Per ĝiro al unu el jenaj kontoj, je la nomo de Universala Esperanto-Asocio:

• Nederlando: ABN AMRO-Bank, IBAN: NL86 ABNA 0426 9014 44 (BIC: ABNA-NL2A) aŭ ING Bank, IBAN: NL96 INGB 0000 6273 37 (BIC: INGBNL2A);

• Je la nomo de Universala Esperanto-Asocio al la konto en:

Belgio: Bpost Bank, IBAN: BE54 0001 6318 3197 (BIC: BPOTBEB1XXX)

Germanio: Postbank, IBAN: DE51 3701 0050 0318 2915 09 (BIC: PBNKDEFF)

Svedio: Nordea, IBAN: SE95 9500 0099 6042 0074 3740 (BIC: NDEASESS)

Svislando: Postfinance,
IBAN: CH86 0900 0000 1200 2310 0 (BIC: POFICHBEXXX).

De ekster Nederlando nepre aldonu 10 eŭrojn por la bankokostoj.

**Ĉekoj.** Bankan ĉekon bv. sendi al la konstanta adreso. Ĝi estu en eŭroj kaj nepre aldonu 25 eŭrojn por la banko-kostoj. Prefere sendu ĉekojn titolitajn al unu el la bankoj en Nederlando. Ĉiam bv. klare indiki la celon de via pago.

**Kreditkartoj.** Eblas pagi ankaŭ per Visa, Eurocard, Mastercard kaj American Express, indikante la kartonumeron, ĝian validodaton kaj la 3 kontrolciferojn malantaŭe sur la kartoj (CVC-numero). Tiukaze bv. aldoni 5% al la pagata sumo por administraj kostoj. Por grandaj sumoj estas konsilinde uzi alian pagmanieron.

**Paypal.** Eblas pagi pere de Paypal uzante la adreson financoj@co.uea.org. Bv. aldoni 5% al la pagata sumo pro administraj kostoj.

## Asekuro

La kongreskotizo inkluzivas nenian asekuron: ĉiu aliĝinto zorgu mem pri taŭga vojaĝasekuro. La UK ne repagas mendojn (loĝado, ekskursoj k.a.) se la malmendo venas post la limdato. Ĉar temas pri relative grandaj sumoj, estas konsilinde asekuri sin kontraŭ eventuala nepartopreno.

## Donacoj

La UK bonvenigas donacojn por:

• Adoptaj Gepatroj: subvencias partoprenon en la Infana Kongreseto de infanoj el landoj kun transpagaj problemoj.

• Fondaĵo Canuto: helpas membrigon al UEA de esperantistoj el landoj kun transpagaj problemoj.

• Triamonda Kaso: helpas al kongresanoj el triamondaj landoj.

• Blindula Kaso: helpas al blindaj kongresanoj.

• Volontula Fondaĵo: subtenas volontulan servon ĉe la Centra Oficejo.

• Ĝenerala Kaso: por la ĝenerala subteno al la organizado de la UK.

• Arta Kaso: helpas financi artistojn por prezentiĝo dum la Universalaj Kongresoj.

Mencio pri ĉiu donacinto aperos en la Kongresa Libro kaj en la revuo *Esperanto*.

# Kontaktinformoj

**Centra Oficejo de UEA, Kongresa Fako** (bv. skribi nur al la Kongresa Fako, ne al LKK)**:** Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando; tel. +31 (0)10 436 1044, fakso: +31 (0)10 436 1751; retadreso: kongresoj@co.uea.org

# Kongresaj perantoj

Se en via lando estas peranto, prefere sendu viajn mendilon kaj pagon al tiu. Se ne, bv. sendi la mendilon kaj pagon al Roterdamo. Mendojn sen pago oni ne traktos.

| | |
|---|---|
| Aŭstralio | Aŭstralia E-Asocio, GPO Box 2122, Melborne VIC 3001 |
| Aŭstrio | Leopold Patek, Martinstr. 104/38, 3400 Klosterneuburg |
| Belgio | Flandra Esperanto-Ligo, Lange Beeldekensstr. 169, 2060 Antwerpen *aŭ* Claude Glady, 1 rue du Culot, 5630 Cerfontaine |
| Britio | E-Asocio de Britio, Station Rd, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE |
| Ĉeĥio | Ĉeĥa E-Asocio, p/a Petro Chrdle, Anglická 878, 252 29 Dobřichovice |
| Ĉinio | Ĉina Esperanto-Ligo, P.O. Kesto 825, 100037 Beijing *aŭ* Trezoro Huang Yinbao, Esperanto-Centro, Jinqiao Touzi, Gongsi, (18893316800), Jingchuan-Xian, 744300 Nong Lin-Lu, Pingliang Gansu |
| Danio | Arne Casper-Mortensen, Bryggervangen 70, 4.tv., 2100 København |
| Estonio | Ahto Siimson, Rüssa tee 2, Liu, 88302 Audru vald, Pärnumaa |
| Finnlando | E-Asocio de Finnlando, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki |
| Francio | Espéranto-France, 4 bis, rue de la Cerisaie, 75004 Paris |
| Germanio | Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Str. 9, 55129 Mainz |
| Grekio | Helena Esperanto-Asocio, Agiou Meletiou 83, 112 51 Athina |
| Hispanio | Pedro A. Garrote Escribano, C/ Las Mercedes 5-5º-C, 47006 Valladolid *aŭ* Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 1008, 08200 Sabadell |
| Hungario | Hungaria Esperanto-Asocio, Pf. 193, 1368 Budapest |
| Israelo | Jehoŝua Tilleman, 97-a Dereĥ-Akko, 263734 Kirjat-Mockin |
| Italio | Itala E-Federacio, Via Villoresi 38, 20143 Milano |
| Japanio | Japana E-Instituto, Waseda-mati 12-3, Sinzyuku-ku, 162-0042 Tôkyô |
| Kanado | Normand Fleury, 173 rue Grove, Granby, QC, J2G 4M9 |
| Korea Resp. | Korea Esperanto-Asocio, 1601 (Gangbyeon Hansin Core), 18 Mapo-daero 4da-gil, Mapo-gu, Seoul - 04177 |
| Kroatio | Davor Klobučar, Huttlerova 27 A, 31000 Osijek |
| Latvio | Margarita Želve, Rūpniecības iela 35-13, Rīga 1045 |
| Litovio | Litova E-Asocio, ab.k. 167, 44002 Kaunas C |
| Nederlando | UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam |
| Norvegio | Agnar Fitjar, Wiers Jenssens vei 33A, 5089 Bergen |
| Pollando | Jan Skonieczka, ul. Chłodna 23ª, 85-345 Bydgoszcz |
| Rusio | Miĥail Ĉertilov, Titova 6-24, 606211 Liskovo *aŭ* Halina Gorecka, ab.ja. 1205, 236039 Kaliningrad |
| Slovakio | Ľubomír Fajth, Plevník 105, 018 26 Plevník |
| Svedio | Leif Holmund, Kågevägen 40 B, LGH 1303, 931 38 Skellefteå |
| Svislando | Poŝtĉekkonto CH86 0900 0000 1200 2310 0 je la nomo "Universala Esperanto-Asocio" |
| Usono | Esperanto-USA, 1500 Park Av #134, Emeryville CA 94608 |

# Por komforte flugi al Seulo, flugu per Asiana

Asiana Airlines, la oficiala flugkompanio de la 102-a UK, estas multfoje elektita kiel unu el la plej bonaj flugkompanioj de la mondo. Ĝi havas 83 aviadilojn kaj rekte flugas al 75 urboj en 24 landoj. Kunlabore kun siaj partneraj flugkompanioj de Star Alliance, ĝi atingas la tutan mondon.




La elstare atentemaj servistoj, kvalito de la manĝoj kaj modernaj aviadiloj faros vian vojaĝon neforgesebla.

Por pliaj informoj kaj por rezervi viajn biletojn, bv. kontakti la plej proksiman oficejon aŭ reprezentanton de Asiana aŭ viziti la retejon: **flyasiana.com**

ASIANA AIRLINES
아시아나항공
A STAR ALLIANCE MEMBER